

RADIOAMATORA  
ESPERANTO-  
TERMINARO

por RADIOFONIO

*angla - Eo*  
ĴARGONA -  
ESPERANTA

*Bruno*  
KHGGT 1973

FSRC de F9ED

tiun terminaron mi ricevis de Bruno Chambers KH6GT  
Kion vi opinias pri tio? Kio nova? 73+88

mi transdonis kopiojn al <sup>mi flus OM 9</sup> F1AYP, <sup>DCD</sup> F2JA, <sup>+</sup> F2LT,  
F8MD, F8NS, F94S kaj Sro Aisberg

Soupa  
Ardia Cury

Bogard

50110

Toulaville

## UNIVERSAL ESPERANTO PHONETIC ALPHABET

|                        |                       |                                          |
|------------------------|-----------------------|------------------------------------------|
| A <u>AL</u> -FA        | M <u>MA</u> -SHI-NO   | Y <u>YAN</u> -KI                         |
| B <u>BRA</u> -VE       | N <u>NO</u> -YEM-BRO  | Z <u>ZU</u> -LU-O                        |
| C <u>TSI</u> -GAR-ET-C | O <u>OK</u> -TO-BRO   | Ø <u>NU</u> -LO                          |
| D <u>DEL</u> -TA       | P <u>PA</u> -PA       | 1 <u>U</u> -NU                           |
| E <u>EK</u> -O         | Q <u>QWE</u> -BEK     | 2 DU                                     |
| F <u>FLO</u> -RO       | R <u>RE</u> -KOR-DO   | 3 TRI                                    |
| G <u>GA</u> -LO-NO     | S <u>SO</u> -FA       | 4 KVAR                                   |
| H <u>HO</u> -TEL-O     | T <u>TRI</u> -UM-FO   | 5 KVIN                                   |
| I <u>IN</u> -DI-AN-A   | U <u>U</u> -NI-FOR-MO | 6 SES                                    |
| J <u>YU</u> -LI-ET     | V <u>VIK</u> -TO-RO   | 7 <u>SEP</u> -EN                         |
| K <u>KI</u> -LO        | W <u>WIS</u> -KI      | 8 OK                                     |
| L <u>LU</u> -NA        | X <u>EKS</u> -REY     | 9 (as <i>now</i><br>English <i>now</i> ) |

Pronounce as in English, but with vowel

sounds A as in father, E as in let, I as in machine, O as in or and U as in zulu.

TS is pronounced as in cats. Accented syllables are underlined. The spelling of some of these words is different in Esperanto, but the pronunciation is the same.

## Note.

Non-Esperantists are cautioned not to attempt spoken use of the Esperanto terms in this booklet until they have familiarized themselves with the grammar of Esperanto.

## (Anglalingva Antaŭparolo)

## FOREWORD

A half century ago amateur radio began to span distance, national boundaries and vast oceans to give to the ordinary man the technical capability for direct voice contact with any place on the globe. This new capability greatly accentuated the world language problem, and prominent amateurs in Japan and The U. S. began to consider favorably the adoption of Esperanto as the international language for amateur radio.

Unfortunately the Esperantists failed to capture this unique opportunity for practically proving Esperanto in real international use. Either from lack of Esperantists who were also radio amateurs, or because Esperantists generally did not notice the opportunity, nothing concrete was accomplished toward the adoption of Esperanto.

During the beginning years, radio communication was all by morse code, using internationally accepted letter group symbols for very limited international communication. Although these symbols were useful in telegraphy, they were not suited for phone, due to the lack of an internationally standard set of letter names to say the letters of the symbols. Both the American Radio Relay League and the Radio Society of Great Britain advise against voice use of the symbols, but without proposing a better method of intercomprehension for voice contacts.

With the evolution of radiotelephone, amateurs urgently needed at least some method of international communication, so of necessity they began voice use of the morse symbols, adding slang and standard English words to create the present jargon of the radio amateur, a jargon hardly understandable to a non-English speaking amateur.

Between Esperantist radio amateurs this jargon is completely unnecessary. Tests during hundreds of contacts between Esperantists and non-Esperantists show that even here the jargon is unnecessary, provided that the Esperantist carefully selects his words in Esperanto.

Strict avoidance of the customary jargon in phone contacts is recommended for Esperantists. The aim of this glossary is to suggest fitting Esperanto terms to replace the customary jargon for contacts in Esperanto.

Buno, KH6CT.

Antaŭ duonjarcento amatora radio komencis transsalti distancojn, landlimojn kaj vastajn oceanojn por doni al la ordinara homo teknikan kapablon por rekta voĉa kontakto kun iu ajn loko sur la terglobo. Tiu ĉi nova kapablo multe akcentis la mondan lingvoproblemon kaj elstaraj amatoroj en Japanujo kaj Usono komencis favore konsideri adopton de Esperanto kiel la internacia lingvo por amatora radio.

Bedaŭrinde la esperantistoj ne sukcesis kapti tiun unikan oportunion por praktika provado de Esperanto en vere internacia uzado. Aŭ pro manko de esperantistoj kiuj ankoraŭ estis radioamatoroj, aŭ ĉar esperantistoj ĝenerale ne rimarkis tiun oportunion, nenio konkreta pri enkonduko de Esperanto efektiviĝis.

Dum ĝiaj komencaj jaroj radiokomunikado estis tute per morso, uzante internacie akceptitan literaturan simbolaron por tre limigita internacia interkompreno. Kvan- kam tiu simbolaro utilis en telegrafio, ĝi ne bone taŭgis por telefonio, ĉar mankis internacie norma literumaro por paroli la literojn de la simboloj. Kaj Radio-Societo de Grand-Britujo (RSGB) kaj Amerika Radio-Relaja Ligo (ARRL) konsiladas kontraŭ voĉa uzo de tiu simbolo, sed sen proponi pli taŭgan inter- komprenigilon por voĉaj kontaktoj.

Kun la evoluo de radiofonio, amatoroj urĝe bezonis almenaŭ ian voĉan interkom-

prenigilon por eksterlandaj kontaktoj, kaj ili pro neceso komencis voĉuzi la morgan simbolaron, aldonante slangajn kaj normajn anglajn vortojn por krei la nun- tempajn ĵargonon de la radioamatoro, ĵergo- no apenaŭ komprenebla al ne anglalingvaj amatoroj.

Inter esperantistaj radioamatoroj tiu ĉi ĵergono tute ne necesas. Provado en centoj da radiofonijaj kontaktoj inter esperantistoj kaj ne esperantistoj mon- tris, ke eĉ ĉi tie la ĵergono ne necesas, kondiĉe ke la esperantisto zorgas elektas siajn vortojn en Esperanto.

Strikta evitado de la kutima ĵergono en radiofonio estas nepre konsilenda al esp- erantistoj. La celo de tiu ĉi terminaro estas sugesti taŭgajn esperantovortojn por anstataŭi la kutiman ĵargonon dum radiokontaktoj en Esperanto.

Por fariĝi esperanta vortaristo oni nepre devas esti poligloto. Aĵoj de Esp- erantista Radio-Rondo de Pacifiko, kiuj kompilis tiun ĉi terminaron, estas individue nur dulingvaj, sed kolektive ni estas poliglotoj. Dum la kompilado ni kunvenadis ĉiutage per amatora radiofonio por kompari notojn kaj diskuti problemojn.

Precipe aktiva en la kompilado estis JRLISC, JASHCH, JASHAA, XELM, XE2AC, XE2CB, YNLVKR/PY2 kaj ZLLLP. KH6GT tajpis la tekston por la preso kaj kulpas pri ĉiuj eraroj. Buno, KH6GT

# KLARIGOJ

La difinoj en tiu ĉi terminaro estis elektitaj surbaze de la aktuala ĉiutaga uzado de la ĵargonaj vortoj kaj simboloj. la oficiala difino ofte estas alie, ekz., handle: oficiale = tenilo, ĵergone =

nomo.  
QRZ: oficiale = "Mi vokos vin refoje je \_\_\_\_\_", ĵergone = momentoni!

La prononcado de la ĵergono estas ĥaosa kaj ne praktike montrebla ĉi tie, ekz., por QRZ oni aŭdas "kju-ar-zi," "kŭin- raĝer-san'zibar," "zu-ara-zeta," "kilo- ro'meo-zulu," ktp. Apenaŭ taŭga por internacia lingvo!

Signoj uzataj en tiu ĉi terminaro:  
\* aŭ aldona signifo aŭ neologismo.  
-- anstataŭas la kapvorton de la koncerna artikolo.  
/ kunmetaĵo.  
pp parolante pri.  
v vidu.  
Ĵargonaj vortoj portas dikajn literojn.

Ofsetita 1973

Prezo aŭfrankita, du respondakupoj.  
B. J. Chambers, KH6GT  
1740 Nakula St.  
Wahiawa, Hawaii 96766

# UNIVERSALA ESPERANTA LITERUMA ALFABETO

|          |           |             |            |
|----------|-----------|-------------|------------|
| Alfa     | Indiana   | Sofa        | Ø mulo     |
| Brave    | Juliet    | Ŝilingo     | 1 unu      |
| Cigareto | Ĵurnalo   | Triumfo     | 2 du       |
| Ĉefo     | Kilo      | Uniformo    | 3 tri      |
| Delta    | Luna      | Ŭ uniformoj | 4 kvar     |
| Eko      | Maŝino    | hoko        | 5 kvin     |
| Floro    | Novembro  | Viktoro     | 6 ses      |
| Galono   | Oktobro   | W ŭiski     | 7 sep(eno) |
| Ĝirafo   | Papa      | X eks-rej   | 8 ok       |
| Hotelo   | Q kŭebek' | Y janki     | 9 naŭ      |
| Ĥaoso    | Rokordo   | Zuluo       |            |

Okaze de miskompreno kun neesperantisto oni uzas alternajn esperantovortojn, ekz. Galono, Gvatemalo; Triumfo, Tokio, Tango.

AC adapter admittance AF venca elektro. affirmative! jes! AGC aŭtomata gajnokompensilo: cirkvito en ricevilo por aŭtomate kompensi ŝanĝojn en la forto de la signalo de la anteno.

ALC aŭtomata nivelo-regulo: cirkvito per kiu tro altaj envolopopintoj de radielektra\* signalo en fina amplifilo de sendilo estas rektifataj kaj retrokulpataj al antaŭa ŝtupo por malpliigi gajnon kaj malebligi troan signalon al la fina amplifilo.

alternating alternanta. alternator alternilo. AM amplituda modulado. ammeter ampermetro. thermocouple -- termokupla --. ampere ampero. ampere-hour amperhoro. ampere turn ampervolvo. amplifier amplifilo. class A -- A klasa --: amplifilo kiu lineare amplifas la tuton de signalado; por ŝuspecaj signaladoj. class B -- B klasa --: kiu amplifas lineare nur dum unuflankaj alternancoj de signalo; por radielektra signalo forte resonanca cisterna cirkvito restarigas la mankantajn alternancojn; por plena lineareco kun aŭdelekto du amplifiloj estas konektitaj en kontraŭfaza (puŝ-tena) cirkvito. class C -- C klasa --: kondukta nur dum la pintoj de unuflankaj alternancoj; ordinare uzata nur por unufrekvenca signalo aŭ por frekvencomodulata signalo. push-pull -- puŝ-tena --: ĝemelaj amplifiloj konektitaj kontraŭfaze. anode anodo. antenna anteno. -- array grupanteno. beam -- faska, unudirekta --. coaxial -- samaksa manikdipolo. delta -- dipolo --. dipole -- dipolo: duonondlonga anteno. discone -- diskokonusa --. dummy -- fantoma --: provada anstataŭa aparato kiu ŝerpas kaj konvertas al varmigo la elmetan signalon de sendilo dum provado. ground plane -- vertikala konusjupa aŭ diskjupa dipoleca anteno. loop -- ringforma --. quad -- kvado\*: kubeca anteno kun du kvadrataj plenondlongaj dratobukloj. yagi -- jagianteno: unudirekta grupanteno kun nutrata dipolo kaj unu aŭ pluraj parazitaj dipoloj.

aro arko. attenuate atenui. audio aŭdelekto\*: aŭdfrekvenca elektro. balanced modulator ekvilibra modulilo: modulilo por ekvilibre nuligi la portadon de amplitude modulata signalo en flankonia sendilo; speco de heterodino. balun baluno\*: speciala radielektra transformilo por ekvilibrigi kaj akordigi samaksan kablaron al centre nutrata dipolo aŭ al ĝemela lineo. bazooka -- manikobaluno: aranĝaĵo en kiu izolita metalo maniko kovras la finan kvaronon de samaksa kablo kun konekto nur inter sia interna fino kaj la tega konduktilo de la kablo, efektive ekvilibrigante la kablolinon kontraŭ eksteraj elektrokampo. band bendo\*: aro da frekvencoj, troviĝante unu apud alia en fiksa loko sur la frekvencospekto, kaj asignita al aparta radioservo; ekz., 10 metra amatora bendo, televida bendo, ktp. barefoot sen postamplifilo. base bazo\*: elektrodo en dujunta transistoro, analoga al regula krado de trioda jontubo. battery pilaro, baterio. -- charger ŝargilo. dry -- seka --. storage -- akumulato. BCI difekta intermikso al disaŭdiga signalo. BFO heterodina oscililo. bias polarizo: la apliko de ekstera tensio por estigi iun potencaldiferencon inter du punktoj en cirkvito. bootlegger pirato: neamatoro kiu uzas fiksan identsignon aŭ piratas identsignon de amatoro por ŝajnigi, ke li estas leĝa amatoro. break! he! he! voko por enrompi kontakton kaj samtempe montri al esperantisto, ke la enrompanto estas samideano. broadcast disaŭdigo. buckshot pladado: v aplatter. bureau buroo: landa organo por distribui konfirmkartojn. cable kablo. coaxial -- samaksa kablo. CAL, calibrator kalibrilo: kristala frekvencomarka oscililo por kontroli kaj kalibri frekvencoŝtalon de radioaparato. call, call sign identsigno: individua grupo da literoj kaj ciferoj servanta kiel oficiala internacia identigilo por radiostacio. callbook stacilista libro: listolibro de amatoraj radiostacioj, kun identsignoj, nomoj kaj adresoj.

cans aŭdilaro\*: kapadiloj  
 capacitor kondensilo: kondensato?  
 adjustable -- alĝustigebla --  
 blocking -- bar --  
 bypass -- pas --  
 ceramic -- ceramika --  
 differential -- diferenciga --  
 electrolytic -- elektroliza --  
 fixed -- fiksa --  
 mica -- glima --  
 neutralizing -- neŭtriga --  
 paper -- papera --  
 tuning -- agorda --  
 vacuum -- vakua --  
 capacity kapacitanco, kapacito.  
 carrier portondo.  
 channel kanalo: fiksa frekven-  
 co kun flankzonspaco, asignita al  
 stacio aŭ grupo da stacioj en la sama  
 servo, ekz., televida kanalo dektria,  
 ŝipo-borda kanalo, ktp.  
 channel kanalo\*: maldika strio  
 de semikonduktanto inter la fonto kaj  
 drenilo de kampo-fika transistoro.  
 charge ĉargi.  
 chassis ĉasio.  
 choke coil barbobeno.  
 circuit cirkvito.  
 -- breaker -- breŝilo: flumilo?  
 -- diagram, schematic skemo, cirkvitskemo.  
 primary -- primara --  
 secondary -- sekundara --  
 short -- fuŝkontakto.  
 clarifier klarigilo: cirkvito en  
 flankzonio sendrivelilo por ionate  
 ŝanĝi la ricevan frekvencon dis de la  
 elsenda frekvenco.  
 clipper limigilo.  
 coax samaksa, samaksa kablo:  
 dukonduktila radielektra kablo kun  
 komuna akso. + samcentra?  
 coil bobeno.  
 iron-cored -- ferkerma, ferito-  
 kerna --  
 tapped -- derivita --  
 toroid -- tora --  
 collector kolektilo\*: elektrodo  
 en dujunta transistoro, analoga al anodo  
 en jontube.  
 commercial power elreta kurento: elek-  
 tra kurento el publika distribua reto.  
 condenser kondensilo: v capaci-  
 tor.  
 conditions kondiĉoj: la kondiĉoj  
 en la jonasfero kiuj regas propagadon  
 de radiondoj.  
 conductance konduktanco.  
 conduction kondukto.  
 conductor konduktilo.  
 confirm konfirmi: pp ricevo  
 de elsendo.  
 connection konekto. + junto?  
 cascade -- kaskada --  
 parallel -- paralela --  
 series -- seria --

constant konstanto.  
 time -- tempo.  
 contest konkurso.  
 converter konvertoro, konvertilo  
 RF -- heterodino.  
 copy kapti: aŭdi kaj  
 kompreni elsendon.  
 core kerno.  
 correct! ĝuste! perfekte!  
 coupling kuplo.  
 capacitive -- kapacitanta --  
 inductive -- indukta --  
 crossband krucbenda\*: pp kon-  
 takto en kiu la du stacioj elsendas kaj  
 ricevas en apartaj bendoj.  
 CQ! iu ajn!: taŭga esper-  
 anto-voko por montri, ke esperantisto  
 vokas.  
 crystal kristalo.  
 quartz -- kvarco --  
 current kurento.  
 alternating -- alterna --  
 direct -- rekta --  
 eddy -- kirla --  
 curve kurbo.  
 characteristic -- karakteriza.  
 CW radiomorso, morso. (Al)  
 cycle ciklo.  
 half -- alternanco.  
 DB, decibel decibelo.  
 DC rekta kurento. *vid*  
 decoupler senkupro.  
 detector detektilo, detektoro  
 diode -- dioda --  
 product -- heterodino --  
 deviation ratio deviada raporto: pp  
 frekvencomoduado, raporto inter la  
 maksimuma modulada frekvenco kaj la  
 maksimuma deviado de la portonda  
 frekvenco.  
 dial ciferplako, frekvenco-  
 plako. + ŝkalo?  
 diaphragm diafragmo.  
 dielectric dielektriko.  
 diode diodo: duleketroda  
 jontube aŭ solidstata aparato tra kiu  
 kurento normale povas flui nur en unu  
 direkto.  
 crystal -- kristala, solid-  
 stata --  
 silicon -- silicia --  
 tunnel -- tunelo\* --: solid-  
 stata diodo kiu prezentas negativan  
 rezistancan je certaj tensiniveleoj.  
 zener -- zenera\* --: solid-  
 stata diodo kies inverspolara trarompa  
 aŭ lavanga nivelo restas konstanta kun  
 ŝanĝoj en inverskurento.  
 dipole dipolo: duonondlonga  
 anteno.  
 folded -- faldita --: tro prok-  
 sime interspacigitaj paralelaj dipoloj  
 interkonjektitaj nur ĉe la finoj kaj kun  
 unu dipolo tranĉita kaj nutrata en la  
 centro; servas multoblige la nutro-  
 punktan impedancon.

director direktilo: antaŭa  
 parazita dipolo de grupanteno por  
 direktila la ondojn antaŭen.

discriminator frekvencodistingilo:  
 detektilo por frekvencomodulata signalo.

distortion distordo.

distributed distribuita.

-- capacity -- kapacitanco: dis-  
 tribuita inter la volvoj de bobeno,  
 laŭlonge de lineo, ktp.

doubler duobligilo: ŝtupo por  
 duobligi la frekvencon de oscilado.

doublet paranteno: simetria  
 centre nutrata anteno.

drain drenilo\*: elektrodo de  
 kampefika transistoro, analoga al la  
 anodo de jontubo.

driver ekscitoŝtupo\*: ŝtupo  
 kiu ekscitas finan amplifilon en  
 sendilo.

dry cell seka pila.

DX eksterlanda: pp long-  
 distanca radiokontakto.

DXCC centlanda diploma:  
 premio donata pro kontaktoj kun cent  
 diversaj landoj; necesas nur kontakti,  
 ne efektive komuniki!

echo eĥo.

multipath -- plurvoja -- okazas  
 kiam signalo alvenas laŭ pluraj  
 malegalaj vojoj.

electrical length elektra longo: efika  
 elektra longo de konduktilo; por lineo  
 ĝi estas la fizika longo dividite per  
 la rapidokonstanto de la lineo; por  
 dipola anteno oni dividas per la longo-  
 faktoro de la anteno.

electrodynamic elektrodinamika.

electrode elektrodo.

electrolyte elektrolito.

electron elektrono.

-- beam elektronfasko.

electronics elektroniko.

electrostatic elektrostatika.

-- shield -- ŝirmilo.

element elemento.

antenna -- antena --, dipolo.

driven -- nutrata --.

parasitic -- parazita dipolo:  
 dipolo kiu ricevas energion malrekte  
 per la elektra kampo de senpere nutrata  
 dipolo.

emitter emisiilo\*: elektrodo de  
 dujunta transistoro, analoga al katodo  
 de jontubo.

emergency krizo.

-- net -- krizokaza reto: rondo  
 da stacioj por provizora komunikado dum  
 katastrofo.

excite eksciti: v feed.

exciter ekscitilo\*: signal-  
 generilo aŭ integra sendilo uzata por  
 eksciti postan amplifilon.

eyeball QSO vizaĝovizaĝa renkontiĝo  
 inter radioamatoroj.

fade fado.

farad farado.

micro/-- mikro/--.

pico/-- piko/--.

feed nutri\*: liveri povumon  
 al aparato kiu konvertas aŭ konsumas  
 ĝin; ekzemplo estas sendilo kun post-  
 amplifilo konektita al anteno per lineo;  
 la sendilo ekscitas la amplifilon, la  
 amplifilo ekscitas la lineon kaj nutras  
 la antenon, la lineo nutras la antenon,  
 kaj elektronutra konvertoro per rekta  
 kurento nutras la anodan cirkviton de  
 la amplifilo, ktp.

feedback retrokaplo.

inductive -- indukta --.

ferrite ferito\*: ceramika  
 rekompaktaĵo de mikroskopo erigita fero,  
 efike permeanca al radielektro.

-- bead -- ferita bido: bido el  
 ferito uzata por pliiĝi induktancon de  
 rekta drato.

-- antenna -- feritanteno: peco da  
 ferito ordinare krajongranda kiu servas  
 kiel riceva anteno por mezaj frekvencoj.

FET kampefika transistoro:  
 v JFET

fidelity fideleco.

field kampo.

field day kampotago: ĉiujara  
 tagokto kiam amatoraj stacioj kurtimas  
 iri en la kamparon por praktiki kriz-  
 okazan komunikadon dum ŝajnigita  
 katastrofo.

filament filamento.

filter filtrilo.

bandpass -- zonpasa --.

highpass -- altpasa --.

lowpass -- malaltpasa --.

final finamplifilo\*: fina  
 amplifilo en sendilo aŭ aparta post-  
 amplifilo.

flat line plenakorda lineo:  
 nutra lineo sen staranta ondo.

flux fluks: pp magneto.

fone radiofono, telefono.

frequency frekvenco.

VLF tre malalta frekvenco:  
 3 ĝis 30 kilohercoj.

LF malalta frekvenco:  
 30 ĝis 300 kilohercoj.

MF meza frekvenco:  
 300 ĝis 3000 kilohercoj.

HF alta frekvenco:  
 3 ĝis 30 megahercoj.

VHF tre alta frekvenco:  
 30 ĝis 300 megahercoj.

UHF ultraalta frekvenco:  
 300 ĝis 3000 megahercoj.

function funkcio.

fuse fandodrato. = gardilo

galvanic galvan.

gamma match gamoforma akordigilo:  
 rektolinia transformilo en formo de  
 greka litero ĝamo (renversita L) kun  
 ĝia vertikalo ĉe la centro de kontinua  
 dipolo; por akordi kaj ekvilibrigi sam-  
 aksan nutran lineon al dipolo.

Piv nutri 3/

au veturi!

g?

g?

Cent an

gate pordo\*: elektrodo de  
kampefika transistoro, analoga al  
reguliga krado en trioda juntubo.  
germanium germanio: malofta  
metalo uzata en solidstata elektroniko.  
GMT universala tempo, UT:  
meza sunotempo ĉe grenvicia meridiano.  
grid krado.  
control -- reguliga --.  
screen -- ŝirma --.  
suppressor -- haltiga --.  
grid dipper resonanca provilo:  
speciala agordebla kalibrita oscililo  
kun mezurilo por montri la relativan  
nivelon de oscilado; kiam ĝia bobeno  
estas kuplita al provata resonanca  
cirkvito kaj agordita al la frekvenco  
de resonanco, okazas akra eksaŝngo sur  
la mezurilo; tiu eksaŝngo indikas la  
resonancopunkton de la provata cirkvito.  
ground tero, terkonekto.  
ham radiosamatoro.  
handle radionomo: kutime  
mallongigo de persona nomo.  
harmonic harmono.  
headphones aŭdilaro\*: kapaŭdiloj.  
heat sink varmodrenilo: plisita  
aŭ multe kanelita metalpeco por for-  
kondukti internan varmon de solidstata  
aparato.  
heater hejtilo.  
height alto.  
henry henro.  
hertz herco: unuo de frek-  
venco; unu herco estas po unu ciklo (en  
sekundo) = Sekunde  
heterodyne heterodino\*: aparato  
por ŝanĝi frekvencon de signalo per  
interbatado kun oscilado de alia frek-  
venco, kreante du novajn signalfrek-  
vencojn, suman kaj diferencon; nepre  
necesas por frekvencoŝanĝado kaj detekt-  
ado de flankzona senportonda signalo.  
HII rido: pli taŭgas, ke  
oni efektive ridi anstataŭ voĉe diri  
"rido".  
home-brew memfarita, memkonstru-  
ita. hejmfarita - mi mem faris  
ham zumado.  
IC integrita cirkvito:  
solidstata cirkvito mikroskopo formita  
sur malgranda (spliteto) el semikondukt-  
anto; tipa cirkvito enhavas plurajn  
transistorojn, diodojn, rezistilojn,  
ktp.  
IF intermeza frekvenco:  
la frekvenco de ŝtupo inter du hetero-  
dinoj aŭ inter heterodino kaj detektilo.  
image frequency spegulfrekvenco: la  
kontraŭa el la du novaj frekvencoj  
produktitaj en heterodino.  
impedance impedanco.  
matched -- akordigita --.  
characteristic -- karakteriza --.  
info informajo.  
inductance induktanco.

input enmeto.  
-- power enmeta povumo: pp  
sendilo; la rektakurentaj vatoj ĉe pitaj  
en la anoda cirkvito de fina amplifilo.  
insulator izolilo.  
interference intermikso\*: konfuza  
miksado inter radiosignaloj.  
ion jono.  
ionosphere jonosfero: superaĵ  
tavoloj de la atmosfero kiuj estas jon-  
igitaj de sunoradiado; la jonigitaj  
tavoloj reflektas radiondojn al la tero  
kaj ebligas longdistancon altfrekvencan  
radiokomunikadon; la nivelo de jonigo  
ŝanĝiĝas laŭ tri varioj, la horo de la  
tago, la sezono kaj la dekmajara ciklo  
de sunomakuloj; ŝefaj tavoloj estas  
F-2 kaj E.  
jack jakto, ŝtopilingo.  
JFET junta kampefika trans-  
istoro: en kiu la pordo unuiĝas kun la  
kanalo; ĝi ĉerpas malpli da ekscita  
kurento ol ĉerpas dujunta transistoro.  
junk fatraso: malorda aro  
da ŝajne ne plu utiligeblaj partoj.  
key klavo/ŝalti.  
key clicks klavoklikado: kontraŭ-  
norma larĝfrekvenca eksterkanala klik-  
ada radiado pro difekto en klavocir-  
kvito de morsa sendilo.  
knob butono.  
lead interkonstanta drato.  
length factor longofaktoro: pp  
dipola anteno; la elektra longo divid-  
ite per la fizika longo, ekz., la  
longofaktoro de drata dipolo kun finaj  
izoliloj estas 0,95.  
license licenco; permeso?  
limiter limigilo: cirkvito por  
limigi la maksimuman nivelon de signalo;  
en ricevilo ĝi forviŝas bruon de frek-  
vencomodulataj signaloj aŭ tondas tro-  
ajn brupintojn de amplitude-modulataj  
signaloj; en sendilo ĝi tondas la fort-  
ajn pintojn de voĉelektro por levi la  
mezan forton de radiofonia signalo.  
line lineo\*: konduktilo kun  
returna vojo por la kurento.  
twin -- ĝemela --: lineo kies  
du konduktiloj estas simetriaj kaj  
ekvilibrigaj al eksteraj elektrokampoj:  
linear lineara.  
-- amplifier post amplifilo: aparta  
lineara fortamplifilo post mezforta  
sendilo.  
load ŝarĝi, impedancakord-  
igi, deĉeigi.  
load elektre plilongigi: pp  
elektre mallonga anteno.  
loading capacity longiga kapacitano:  
ordinare en formo de disko aŭ globo  
konektita ĉe la fino aŭ finoj de mal-  
longa vipo aŭ dipolo por elektre pli-  
longigi ĝin por pli malalta frekvenco.  
loading coil longiga bobeno: bobeno  
serie konektita en mallonga vipo aŭ

dipolo por elektra plilongigi ĝin por pli malalta frekvenco.

local station loka stacio: proksima stacio.

loop buklo.

-- antenna ringforma anteno.

current -- kurenta antinodo.

voltage -- tensia antinodo.

log taglibro, skribi en taglibro.

loss perdo, atenuo.

loudspeaker laŭtparolilo.

lumped kompakta: pp konstantoj en elektra cirkvito.

-- inductance kompakta induktanco: pp la induktanco de bobeno kontraste al la distribuita induktanco de lineo.

magnet magneto.

permanent -- daŭra --.

mast masto.

rho *Simenso* mezuro: mezurunuo de konduktanco; *malomo*.

-meter " -metro\* sufikso por mezurilo.

meter metro: 1000 milimetroj.

microphone, mike mikrofono.

mixer miksililo.

RF mixer heterodino.

AF mixer aŭdelektra miksililo.

mobile *movella* mobila\*: tiu vorto post identsigno signifas, ke la stacio estas instalita en veturilo.

aeronautical -- aeromobila: por stacio en aviadilo.

maritime -- mare mobila: por stacio en ŝipo aŭ boato.

mode signalspeco.

modulation modulado: metodo por surmeti informojn de aŭdelektra aŭ videlektra signalo sur radielektra portondolono?

amplitude -- amplitudo --.

frequency -- frekvenco --.

MOSFET mosfeto\*: metal-oksid-semikonduktanta-kamp-efika-transistoro, en kiu la porde estas izolita de la kanalo je pluraj megomoj per maldikega tavolo el metaloksido; mosfeto plej multe analogas al amplifa ĵontubo.

MUF maksimuma uzebla frekvenco: laŭ jonasferaj kondiĉoj la maksimuma frekvenco kiu reflektiĝas de la jonasfero al la tero.

multiplier plurobligilo.

frequency -- frekvenca --.

voltage -- tensia --: aranĝaĵo en elektromutra konvertoro por rektifi alternan kurenton kaj samtempe plurobligi ĝian tension.

name nomo.

negative! negative!, ne!

negative resistance negativa rezistanco: stato en konduktanto, kie pligo de tensio kaŭzas malpligon en kurento.

neutralize neutrigi: nuligi

reagajn fortojn en amplifilo por mal-ebligi memosciladon.

node nodo: mula punkto de sinusondo.

current -- kurenta --.

voltage -- tensia --.

noise bruoj.

atmospheric -- atmosfera --.

background -- fono --.

ignition -- sparkila --.

power line -- elektroreto --.

noise blanker bruomuligilo: cirkvito por aŭtomate eksilentigi ricevilon dum ekaj altnivelaj bruimpulsoj.

noninductive senindukta.

ohm omo.

OK! bone!, ĝuste!, per-

fektel

old man, OM kunamatoro, kolego, amiko.

operate konduki, funkciigi stacion.

OP, operator kondukanto.

oscillator oscililo.

oscilloscope oscilografio.

out! finol, fino de kontakto.

output elmeto.

over! dol, parolu dol: por ŝanĝi la parolon al la alia stacio.

panel panelo: frontplato.

parasitics parazitaj osciloj: osciloj sur nevolita frekvenco pro fuŝa retrokupro en oscila cirkvito.

patch telefonkonekti: konekti inter telefono kaj radicaparataro.

path vojo.

great circle -- ĉefcirkla vojo: plej mallonga vojo inter du lokoj sur la terglobo; normala vojo de radiando.

long path longa vojo: kontraŭa kaj pli longa vojo laŭ la ĉefcirklo.

PEP envolopopinta povumo: maksimuma momenta povumo en la anoda cirkvito de fina amplifilo.

permeability permeanco.

phase fazo.

piezoelectric premelektra.

pi tank pi-forma cisterno: cisterna cirkvito kun bobeno kaj du kondensiloj, konektitaj en formo de greka litero pio (II).

plate anodo, plato.

plate dip platoklini: dum anoda agordado de fortamplifilo oni observas per kliniĝo en anoda kurento, kiu indikas ĝustan resonancon.

plate dissipation varmodisiga kapable de anodo: mezurata en vatoj.

plug ŝtopilo.

P-N-junction P-N-junto\*: kuniĝo inter du malsantipaj semikonduktantoj, P-tipa kaj N-tipa; normale elektronoj povas flui trans la junto nur en unu direkto, de la N-tipa tra la P-tipa.

polarization polarizo.

*poras esti ununuraj vortoj.*

*laŭ mi, escepte se ili troviĝas de la sama lathudo!*

pole poluso, stango.  
 portable (a) portita: post ident-  
 signo signifas, ke la stacio estas  
 portita al provizora loko.  
 post fosto.  
 telephone -- telefonfosto.  
 potentiometer potenciometro: kon-  
 tinue variigebla rezistilo kun tri  
 klemoj, unu por turnŝovebla deriva  
 kontaktilo kaj du por la finoj de ĝia  
 rezistanca elemento.  
 power povumo: pp vatoj.  
 power amplifier fortamplifilo\*: ago-  
 porta amplifilo, kontraste al tensia  
 amplifilo.  
 power factor agofaktoro.  
 power supply elektronutara konver-  
 toro\*: konverta aparato kiu ĉerpas el  
 akumulatore, alternilo, elektreto aŭ  
 simile, kaj liveras la diversajn nutro-  
 kurentojn al radioaparato.  
 power tube fortika ĵontubo\*: kiu  
 povas akomodti al granda povumo kaj kies  
 anodo povas disĵeti multan varmon.  
 prefix vok prefikso: antaŭa parto  
 de identsigno, kiu indikas la landon  
 de la stacio.  
 preselector antaŭselektilo: selek-  
 tiva ŝtupo antaŭ la unua heterodino en  
 ricevilo, aŭ aparta antaŭa selektiva  
 amplifilo.  
 printed circuit presita cirkvito:  
 cirkvito en kiu la interkonektataj  
 konduktiloj estas prese reproduktitaj  
 sur tabuleto el izola materialo.  
 propagation propagado.  
 Q resonancemo: kvalita  
 faktoro de resonanca cirkvito.  
 Q kuo: ĝia literuma  
 vorto estas "knebek".  
 QRA radionomo.  
 QRM intermikso, interfero?  
 QRN bruoj.  
 QRX ĉeso de elsendado.  
 QRU fino de kontakto.  
 QRX momentoni!  
 QRZ kiu vokas?, kiu volas  
 kontakti?  
 QSB fado.  
 QSL konfirmui, konfirm-  
 karto.  
 QSO radiokontakto.  
 QSY ŝanĝu frekvencon!: oni  
 diras "suben" kaj "alten" por eviti  
 misaŭdon, ekz., "alten je 2 kilohercoj",  
 "suben je 5 kilohercoj", ktp.  
 QTH stacioklo.  
 quad kvado: v antena, quad.  
 radial radialo\*: radiale kon-  
 duktilo kiu plurnombre formas diskon aŭ  
 komunan parton de ĵuspecaj antenoj.  
 radiator nutrata dipolo.  
 rag chew babilado.  
 reactance reaktanco.  
 receiver ricevilo.  
 rectification rektifado.

full wave -- tutonda --.  
 half wave -- duononda --.  
 reflector reflektilo: malantaŭa  
 plato, krado, aŭ parazitita dipolo de  
 anteno por reflekti la ondojn antaŭen.  
 relay relajo, resendi.  
 -- station relaksa stacio.  
 reluctance reluktanco.  
 report signalraporto, raporto.  
 resistance rezistanco.  
 resistor rezistilo.  
 resonance resonanco: okazas en  
 cirkvito kies oscilperiodo egalas al la  
 periodo de la altruditaj osciloj.  
 RF radielektro\*: radio-  
 frekvenca elektro.  
 rig aparataro, ekipaĵo.  
 roger! ricevita!, kaptita!  
 rotary rotacia.  
 rotator turnilo: motoro aŭ  
 alia rimedo por ŝanĝi la direkton de  
 turnebla anteno.  
 RST signalraporto por morso.  
 RTTY radioteletajpo.  
 selective selektiva.  
 semiconductor semikonduktanto: met-  
 ala elemento kies konduktanco estas iom  
 meze inter la konduktanco de bona kon-  
 duktilo kaj tiu de izolilo; uzata en  
 solidstata elektroniko.  
 seven, 7 sep, sepen\*: sepen  
 estas neologismo por klara parola  
 distingebleco inter 6 kaj 7; uzata nur  
 por klara unuopa parolo de bazaj numer-  
 aloj, ekz., por 777 oni ordinare diras  
 "sepen sepdek sep" sed por plena aŭda  
 klareco oni diras "sepen sepen sepen".  
 shack radiodometo, radio-  
 ĉambro.  
 shield ŝirmilo.  
 short circuit fuŝkontakto: akciden-  
 ta cirkvito ordinare kun troa kaj  
 fajrigo kurento.  
 shunt ŝunti.  
 sideband flankzono: mallarĝa  
 strio da informoportantaj frekvencoj  
 estigita unu ĉe ĉiu flanko de portonde  
 dum modulado.  
 signal generator fantomsignala generilo:  
 speciala agordebla oscililo por provi  
 la funkciadon de radiatoricevilo.  
 signal report signalraporto: sciigo  
 pri la klareco (1 ĝis 5) kaj intenso  
 (1 ĝis 9) de ricevita signalo.  
 sine wave sinusondo: sinusoida  
 ondo.  
 single sideband, SSB flankzonio\*: unu-  
 flankzona senportonda radiofonio; sig-  
 nalspeco kutime uzata en amatora radio-  
 fonio; ricevebla nur per ricevilo kun  
 heterodina detektilo por rezoluci la  
 mankantan portondon. (ASJ)  
 sked skedo - rendevuo per radio.  
 skip distance saltistanco: distanco  
 inter la punkto kie radiando deiras  
 antenon kaj la punkto kie ĝi revenas al

tero post reflektado de la jonosfero.  
 skip zone transsaltata zono: zono inter la riceveblimo de terora ondo kaj la reteriga punkto de la jonosfero reflektita ondo; ricevo en tiu zono estas malebla.  
 S-meter signalmetro: por mezuri la relativan intenson de ricevata signalo.  
 socket soklo  
 lamp -- lampsoflo.  
 solder luti  
 -- point lutopunkto.  
 resin core -- rezinkora lutaĵo.  
 soldering iron lutilo.  
 solid state electronics solidstata elektronikono: scienco pri regata movado de elektronoj en semikonduktantoj.  
 source fonto: elektrodado de kampefika transistoro, analoga al katodo de ĵontubo.  
 speech audio voĉelektro\*: neologismo por voĉfrekvenca elektro.  
 speech compressor voĉkompaktigilo: aŭtomata nivelo-regulilo por voĉelektro.  
 speech processor voĉtraktigilo: speciala cirkvito por limigado kaj refiltrado de flankscania signalo en malalttensia ŝtupo de sendilo.  
 splatter plaŭdado: kontraŭnorma radiado de larĝzonoa eksterkanala radiobruo pro troa eksistado en la finaj ŝtupoj de radiofonia sendilo.  
 spurious emission kontraŭnorma radiado.  
 split frequency splitfrekvenca: pp kontakto en kiu la du stacioj elsendas sur apartaj frekvencoj  
 squeel kvietigilo: cirkvito por aŭtomate malŝalti bruon en ricevilo dum periodoj kiam signalo ne estas detektata.  
 SSTV malrapida televido: trege malrapidbilda amatora televida sistemo kies kanala larĝo samas al radiofonio.  
 stage ŝtupo: apartigebla parto de radioaparato kiu funkcias kiel amplifilo, oscililo, rektifilo, k. s.  
 stand by elatendi: atendi respondoprete.  
 standing wave staranta ondo: senmova ondo okazanta sur radielektra linio kiam la linio nutras impedancon malsaman al sia karakteriza impedanco.  
 static electricity statikelektro: senmova ŝarĝo ordinare generata per frota delektrigo de elektronoj ĉe surfaco de dielektriko.  
 storage battery akumulato.  
 schematic skemo, cirkvitskemo.  
 stub stumpo: peco da radiielektra linio kutime ne pli longa ol kvaronondo, uzata por akordiga cirkvito inter malsamaj impedancoj.  
 closed end stub fermfina stumpo: kies du konduktiloj estas interkonektitaj ĉe

unu fino; dependante de ĝia longo ĝi funkcias aŭ kiel induktanco aŭ kiel paralela rezonanca cirkvito.  
 open end stub liberfina stumpo: stumpo sen konekto ĉe unu fino; dependante de ĝia longo ĝi funkcias aŭ kiel kondensilo aŭ kiel serie rezonanca cirkvito.  
 swamp ŝuntstabiligi: ŝunti fortan fiksan impedancon trans la poluso de cirkvito por maski impedanvariojn en la cirkvito mem.  
 switch ŝaltilo, komutilo: ŝaltilo povas nur fermi kaj malfermi cirkviton; komutilo komutas per pluroblaj kontaktiloj.  
 diode switch dioda ŝaltilo: cirkvito por ŝalti alternan kurenton per polarizo trans diodo; polarizo en kurentofluga direkto ŝaltas kaj en inversa direkto malŝaltas.  
 rotary switch turnkomutilo.  
 toggle switch baskula ŝaltilo, baskula komutilo.  
 switch wafer oblato: disketo de turnkomutilo.  
 switch-on ŝalti.  
 switch-off malŝalti.  
 SWR staranta raporto: pro porcio inter staranta ondo kaj iranta ondo en radielektra linio.  
 T-match T-akordigilo: T-forma rektolinia transformilo ĉe mezo de kontinua dipolo por akordigi al ĝemela nutra linio.  
 tank circuit cisterna cirkvito: forte rezonanca cirkvito en oscililo aŭ radielektra amplifilo por netigi la ondformon de osciloj per alterne ŝerpa kaj redona agado de ĝia induktanco kaj kapacitanco.  
 tap derivaĵo: deiriga konekto.  
 television televido.  
 -- camera televida kamero,  
 televidigilo.  
 -- receiver televidilo.  
 to watch -- televidi.  
 temperature temperaturo: prefera oni diras en gradoj celsiusaj.  
 terminal klemo.  
 thermal noise termobruo: ŝuifrekvenca bruo kaŭzita de movado de individuaj elektronoj en konduktanto; blanka bruo.  
 thermocouple termokuplo, termopilo.  
 thermostat termostato.  
 time constant tempokostante.  
 toroid coil tora bobeno.  
 tower masto: postjo; latisturo.  
 crank up -- kranklevebla.  
 transceiver sendricevilo.  
 transformer transformilo: aparato por kupli cirkviton per elektromagneta indukto kaj fiksi ĝustan rilaton inter tensio kaj kurento, ankaŭ por izoli

cirkvitojn kontraŭ senpera kurento.  
autotransformar aŭtotransformilo\*:  
transformilo havanta unusolan volvaĵon  
kun derivoj.

linear -- rektolinia\* -- radi-  
elektra transformilo en kiu rekta line-  
peco anstataŭas volvaĵon kaj kernon.  
quarter wave -- kvarononda -- rekta  
kvarononda peco da radielektra lineo  
kies karakteriza impedanco estas  
algebre meze inter la du impedancoj  
kiujn ĝi akordigas.

transistor transistoro: solid-  
stata amplifa aparato analoga al trioda  
jontubo.

bipolar -- dujunta -- enhavas  
du P-N-juntojn kaj tri elektrodojn,  
kiuj estas emisiilo\*, bazo kaj kolekti-  
lo, analogaj al katodo, krado kaj  
anodo de trioda jontubo; malforta kuren-  
to inter emisiilo kaj bazo reguligas  
multe pli fortan kurenton inter emisi-  
ilo kaj kolektilo; en P-N-P-tipo la  
ŝefa elektronfluo iras en la emisiilon,  
tra la du juntoj kaj el la kolektilo;  
en P-N-P-tipo la fluo estas inversa.

field effect -- kampefika\* -- enhav-  
as minimume tri elektrodojn, kiuj estas  
fonto, pordo kaj drenilo, analogaj al  
katodo, krado kaj anodo de trioda jon-  
tubo; inter la fonto kaj drenilo estas  
maldekstra kanalo\* de senkonduktanto;  
signaltenzio inter la pordo kaj tiu  
kanalo estigas elektran kampon kiu ĉir-  
kaŭpinde reguligas kurenton tra la kan-  
alo; en N-kanala tipo la ŝefa elektron-  
fluo iras en la fonton, tra la kanalo  
kaj el la drenilo; en P-kanala tipo la  
fluo estas inversa; kampefika transis-  
toro analoga al pinŝirano.

transmission line nutra lineo.

transmit elsendi.

trap frekvencobarilo: para-  
lele rezonanca cirkvito por bari frek-  
vencon, aŭ serie rezonanca cirkvito por  
preterdoni frekvencon.

linear -- rektolinia frekvenco-  
barilo: en kiu rekta peco da radielek-  
tra lineo servas kiel rezonanca cirk-  
vito.

trap antenna plurbenda dipolo aŭ  
plurbenda jagio\*: plurrezonanca anteno  
kiu uzas paralele rezonancajn frek-  
vencobarilojn por (fandi) dipolon aŭ  
dipolojn al la ĝustaj longoj por ĝiaj  
pli altfrekvencaj bendoj.

tripler triobligilo: ŝtupo kiu  
triobligas frekvencon de oscilado.

tune agordi.

tuning agordado.

bandspread -- ekspansiskala agord-  
ado.

permeability -- permeanca -- *feturo*  
TVI televidila (intermikso:  
difekta intermikso al televidiga sig-  
nalo.

twinlead  
elektro.

vacuum tube *vakua valvo?*  
jontubo\*, termojona  
tubo: vakuigita tubo aŭ ampolo en kiu  
varmego liberigas elektronojn.

-- diode dioda --: tube enhav-  
anta elektre hejtatan katodon kaj plat-  
an anodon; katoda varmego liberigas  
svarmon da elektronoj en la spacon ĉir-  
kaŭ la katodo; kiam la anodo ricevas  
pozitivan polarizon ĝi forte altiras la  
liberigitajn elektronojn kaj kurento  
fluas tra la vakuo al la anodo; kiam la  
anodo estas negativa la elektronoj for-  
peliĝas kaj la kurento ĉesas traflui;  
diodo analoga al klapvalvo.

-- triode trioda --: diodo kun  
aldonita reguliga krado inter la katodo  
kaj la anodo; kiam la polarizo de tiu  
krado estas positiva ĝi altiras elekt-  
ronojn kaj helpas la fluon inter katodo  
kaj anodo; kiam ĝia polarizo estas neg-  
ativa ĝi kontraŭas la fluon; triodo  
analoga al krano.

varactor varaktoro\*: solidstata  
diodo kies transjunta kapacitanco vari-  
as kun ŝanĝoj en inversa polarizo.

abrupt junction -- abruptojunta --: por  
frekvenca plurebligilo.

graded junction -- gradaĵunta --:  
funkcias kiel variigobla kondensilo.

velocity constant rapidekonstanto: rap-  
ido de radiando en lineo kompare al ĝia  
rapido en libera spaco (0,66 por sam-  
aksa kablo kun polietilena dielektr.).

VFO ŝefagorda oscililo:  
variigobla oscililo kiu determinas la  
frekvencon de agordebla ricevilo aŭ  
sendilo.

video vidoelektr\*: baza

bildofara signalo de televido.

volt volto.

voltage tensio.

-- amplifier -- tensiamplifilo.

voltmeter voltmetro.

VOM diversomezurilo: mez-

urilo por voltoj, omoj kaj miliamperoj.

VOX voĉregata elsendo:

aŭtomata ŝaltado de sendilo kiam oni  
parolas en la mikrofonon.

VIVM amplifa voltmetro: .

voltmetro kun integrita amplifilo.

W *double V<sub>o</sub>, 4026\** pli ĝenerale *germana V<sub>o</sub>*  
komprenebla literumado por simpla liter-  
umado; "ŝiski" estas ĝia literuma vorto,  
ekz., por la identsigno WIAW oni diras  
"doble unu a doble" aŭ "ŝiski unu alfa  
ŝiski". *Piv p1163*

watt vato.

wave ondo.

wavelength ondlongo.

whip vipo\*: fleksebla verg-  
oforma anteno por aŭtomobiloj kaj

boatoj.

winding volvaĵo.

bifilar -- bifilara --. *ĉudrata*

|           |                                          |
|-----------|------------------------------------------|
| ork       | kontakti: pp per radio                   |
| X         | ikso: "eks-raĵ".                         |
| XYL       | edzino.                                  |
| Y         | ipsilono, "janki".                       |
| Z         | amatorino, virino.                       |
| Z, zulu   | universal tempo.                         |
| zepp      | zepelina anteno: horiz-                  |
|           | onta dipolo nutrata ĉe unu fino per      |
|           | kvarononda transformilo el ĝemela lineo. |
| zero beat | nulbato: punkto kie la                   |
|           | frekvenca diferenco inter interbatantaj  |
|           | osciladoj fariĝas nulo; samfrekvenceco.  |
| 73:       | bondeziroj! <i>Saluton!</i>              |
| 88:       | amon kaj kisojn!                         |

### Parta Indekso Esperanta-Ĵargona.

|                   |                       |
|-------------------|-----------------------|
| aŭdilaro*         | v headphones          |
| aŭdelektro*       | v AF                  |
| aŭtotransformilo* | v transformer         |
| baluno*           | v balun               |
| bazo*             | v transistor, bipolar |
| bendo*            | v band                |
| cisterna          | v tank circuit        |
| diodo             | v diode               |
| dipolo            | v dipole              |
| direktilo*        | v director            |
| diversomezurilo*  | v VOM                 |
| drenilo*          | v transistor, field   |
| ekscitilo*        | v exciter             |
| eksciteŝtupo*     | v driver              |
| elektrometra      |                       |
| konvertoro*       | v power supply        |
| elreta kurento*   | v commercial power    |
| emisilo*          | v transistor, bipolar |
| ferito*           | v ferrite             |
| finamplifilo*     | v final               |
| flankzono         | v sideband            |
| flankzonio        | v single sideband     |
| fonto*            | v transistor, field   |
| fuŝkontakto       | v short circuit       |
| heterodino        | v heterodyne          |
| identsigno*       | v call                |
| intermikso*       | v interference        |
| jagianteno        | v yagi                |

|              |                       |
|--------------|-----------------------|
| jontubo* -?  | v vacuum tube         |
| kampekika*   | v transistor, field   |
| kanalo*      | v channel             |
| krucbenda*   | v crossband           |
| kolekttilo*  | v transistor, bipolar |
| konduki      | v operate             |
| limigilo*    | v limiter             |
| lineo*       | v line                |
| mobila*      | v mobile              |
| modulado     | v modulation          |
| mosfeto*     | v MOSFET              |
| N-tipa*      | v P-N-junction        |
| nutri*       | v feed                |
| porde*       | v transistor, field   |
| portita      | v portable            |
| P-N-junto*   | v P-N-junction        |
| radialo*     | v radial              |
| radialektro* | v RF                  |
| ŝtumpo*      | v stub                |
| ŝarĝi        | v load                |
| ŝtupo        | v stage               |
| transformilo | v transformer         |
| tunelo*      | v diode, tunnel       |
| varaktoro*   | v varactor            |
| vato         | v watt                |
| videlektro*  | v video               |
| voĉelektro*  | v speech              |
| zenera*      | v diode, zener        |

### Radionomoj

La radioamatoro kutimas nomi kolegon per mallonga persona nomo sen ia ajn titolo aŭ antaŭvorto. Se tiu persona nomo ne havas substantivan o-finiĝon, esperantisto ne povas trovi lokon por pendigi n-finiĝon kiam akuzativo necesas. Pro tio, kaj ankaŭ por facila prononcebleco, estas konsilende, ke ĉiu esperantista radioamatoro mem elektu sian tute esperantan radionomon por fiera portado sur la radiendoj. En nia rondo la naciilingva nomo Ewen fariĝis Jueno, Chizu fariĝis Ĝinjo, Sunnie fariĝis Buno, ktp. → *mi Revata!*